

Numero: 262.
Marto: 2014.

22-a jarkolekto

Literaturaj Folioj

VESPERTO



Redaktanto:
Apáti Kovács Béla
Kaposvár
Béla király u. 44.
H-7400 HUNGARIO
Telefona: 82/ 410-664
Retadreso: espbel@t-online.hu
Eldonanto: Kapošvara Esperanto Centro
Lingve kontrolis: Tuboly Erzsébet

Printempo

La nuna vintro ne estis tiel frosta kaj terura, kiel en la pasinta jaro. Malgraŭ tio oni jam tre atendas la belan, sunriĉan printempon, kiam invitas nin la kampoj kaj arbaroj per siaj koloraj kaj bonodoraj floroj.

Mi salutas vin, kara Printempo. Mi ĝojegas, kial vi alportis al ni la esperon kaj renaskiĝon. Mi petas vin, per viaj varmetaj sunradioj karesadu nian koron kaj donu esperon al ĉiu homo.

Estus bone, se ankaŭ en la historio de la homaro jam fine estus printempo, kaj malaperus el nia animo la glacia, frosta vintro. La homoj malvarmas, eĉ kelkaj jam frostiĝis pro la malespero. Tiuj ĉi homoj ne vidis la esperon. Ili rezignis en sia sorto dirante: en nian mondon neniam alvenos printempo. Neniam ekfloros la kampoj, kaj sur ili infanoj neniam kurados.

Oni devas kredi kaj esperi. Post ĉiu terura vintro alvenos sunriĉa printempo, kiu varmigis nian koron.

Neniam ni malesperiĝu! Ja ankaŭ nun alvenis la printempo kaj estas varmaj tagoj. Estas bone promeni inter la verdiĝantaj arboj kaj arbustoj aŭskultante la kantojn de la birdoj. Rigardu kaj aŭskultu kiom ili ĝojegas. Tiuj ĉi etaj estaĵoj feliĉe ĝuas la vivon.

Ni imitu ilin kaj ni forgesiĝu pri la malhelaj tagoj. Suno denove brilas kaj ĉio estas gaja.


Alvenis printempo kaj estas la bela monato marto. Ĝin sekvas ankoraŭ multe da karaj monatoj, eĉ poste la somero. La vintro ankoraŭ estas malproksime kaj ni ne pensu pri ĝi. Antaŭ ni la vivo, kaj ni iru en la naturon por ĉirkaŭ brakumi ĉiun arbon!

Kompreneble ankaŭ printempe ne forgesu disvastigi Esperanton por ke baldaŭe ĝi fariĝu la dua gepatra lingvo de la homaro!

-Redaktanto-



La kaserolo kaj la vazo babiladas



-Imagu - diris la kaserolo. - Hieraŭ ĉe ni estis du eksterlandanoj. Ili estis la gastoj de mia mastro.

-El kiu lando ili alvenis? - demandis scivole la vazo.

-Tion mi ne scias, sed ili parolis tre strangan lingvon.

-Kiel ili komunikis?

-Mia mastro kvin jarojn lernis la anglan lingvon. Mi bone aŭdis, kiam li diris al sia edzino: "Karulino, ne okazos problemo, mi lernis la anglan lingvon en la lernejo. Laŭ mi ĉiu moderna homo komprenas ĝin." Tio iomete trankviligis la edzinon kaj ŝi komencis kuiri la vespermanĝon. En mi pretiĝis ĝi kaj tial mi estas informita pri la okazintaĵoj. Mi ĝuste sidis sur la gasforno kun la viandopecetoj kaj aliaj, kiam la eksterlandaj gastoj alvenis gaje kaj bonhumore. La domanoj tuj rapidis saluti ilin. Mia mastro apenaŭ atendis ke povu ekbriligi sian lingvoscion. Tiam okazis la tragedio. La gastoj komprenis eĉ unu vorton el ĝi. La dommastro malgaje diris al la edzino: "Kara mia, ja ili ne parolas la anglan. Kion fari nun?"

Ankaŭ la viro surpriziĝis kaj li estis senkonsila.

La vazo ekscitite diris:

-Ne torturu min! Diru jam, kiel estis solvita la ĝena situacio!

-Mi solvis la problemon.

-Ĉu vi?

-Jes. Verdire en la komenco prepariĝis katastrofa tragedio, sed baldaŭe en mi estis kuirita la bongusta vespermanĝo.

-Ĉu kaj?

-La eksterlandaj gastoj estis tre kontentaj kaj ankaŭ sen komuna lingvo ili sentis kion pensas la alia. Kara vazo, de kiu tiuj belegaj floroj en vi?

-Ĉu ĉi floroj? Bonega demando. Kiuj donacis ilin al la dommastrino laŭ vi?

-Mi ne scias. Bonvolu malkaŝi la sekreton!

-Ĉu vi deziras scii? Nu, mi malkaŝas tion. Hodiaŭ matene donacoliveristo portis ĝin kun la sekva teksto: „DANKEGON POR LA BONGUSTA VESPERMANĜO.”

-Ŝaŝa-

Tagmezotempo

-Lénárt Anna-

Li observis la striitan ĉemizon sur la viro. Kafokoloro. Ĝi bone harmonias kun liaj verdaj okuloj – ŝi ekridetis.

—Ĉu ĝi estas striita de malsupro supren aŭ de supra malsupren – ŝi demandis.

Ŝi paŝis apud la viron kaj ŝi spiris malfacilan kison sur liajn lipojn.

Ŝi malfermis siajn okulojn kaj ŝi atendis varmegan reciprokon. Ŝi ne seniluziiĝis, la gusto de la kiso trairis sian korpon – animon. Ŝi forte enŝovis sin en lian brakumadon. Ŝi aŭdis la rapidantan koropulsadon de la viro. Inter la butonoj ŝi metis ŝian manon sub la ĉemizon kaj ŝi ekkaresis lian bruston.

Ŝi ridegis, kiam la viro ekstremis je ŝia manotuŝo. Ŝi ĝuis kian efikon ŝi havas al li. Malrapide ŝi komencis butumi lian ĉemizon. La viro prenis ŝian manon, li pli rapide spiradis, kiel kutime.

La knabino sciis, ke ŝi ludas per fajro, sed ŝi ne povis kontraŭstari la allogon. Laborejo estas tiu laborejo, ŝi jam aŭdis tion multfoje, sed nun tie ĉi, jes, ŝi deziras ĉi tiun viron.

Estas tagmezotempe. Neniu estas en la konstruaĵo. Ŝi prenis lian manon kaj ŝi komencis tiri al neuzita kontoro.

Subite ŝi haltis kaj ŝi proponis al li siajn lipojn.

Li ne protestis. Ili kunfandiĝis per longa, pasia kisego.

Ili ne ekparolis. Ili okuloj parolis anstataŭ ili. Jam ne estis demando la afero.

Malrapide, sed poste pli kaj pli avide ili komencis senvestigi unu la alian. La vestaĵoj estis ĵetitaj sur seĝon. Ili ne faldadis tiujn, ilin ne interesis, se ĉiom ĉifoniĝos.

Ili karesadis, kisadis unu la alian. La sopiro deziris kontentigon.

La viro kuŝiĝis ŝin sur la skribotablon kaj li tuŝadis ŝin per la lipoj tra la tuta korpo de la knabino. Li spiradis neregule. Li sciis, longe li ne povas elteni, sed la knabino estas la unua. Li vidis tion sur ŝia vizaĝo, jam ankaŭ ŝi deziras la kunfandiĝon.

Unu kiso kaj li penetris ŝin...

Kune ondumis iliaj korpoj, mallaŭta ŝirkrio kaj je momento haltis la tempo ĉirkaŭ ili. Brakumante, trankviliĝante ili atendis, ke ilia spirado denove estu milda, kiel antaŭe.

Ili ambaŭ ekridis. Lasta karesado. Etaj dolĉaj kisoj.

Rapide ili vestis sin.

En tiu momento malfermiĝis la pordo. Finiĝis la tagmanĝo-tempo, alvenis la unuaj kolegoj...

-Tradukis: Apáti Kovács Béla-

Skarabo

-Nagy Lajos-

La skarabo rampas sur la tero. Sed se ĝi rampas aŭ ne ĉiukaze ĝi konsistas el tri ĉefaj partoj, kiel: kapo, torako, abdomeno. Organize do ĝi estas pli evoluinta kiu havas nur unu ĉefan parton, kiel: la ventro. Anstataŭ la ventro de kelkaj homoj estas ankaŭ abdomeno, tiaj uloj estas trafte nomata skarabaĉo.

La skarabo nutras sin per skaraboj. La granda skarabo manĝas la mezskarabojn, la mezskaraboj la skarabetojn, la skarabetoj la pli malgrandajn. La plej etaj skaraboj havas misŝancon.

Ekzistas multspecaj skaraboj, ekzemple: majskarabo, blato, vulgara kantarido, cerambiko, lukano, akvoskarabo, kokcino kaj ankoraŭ multaj. Sed en la kapo de la skarabo tio apartenas al alia kategorio. Krom la multnombraj skaraboj ankoraŭ estas almenaŭ milmilionspecaj skaraboj, sed kompreneble el ĉiu nur po unu, se sur la tero vivas milmiliono homoj kaj ĉiu havas po unu skarabon.

Iu skarabo ŝatas la sunon kaj sekajn lokojn, la alia la malhelecon kaj la humidan teron, kavernojn, kelon, malseketajn lokojn. Inter la keloskaraboj kaj la urbaj malriĉuloj estas simileco opiniis komence kelkaj sciencistoj, sed poste aliaj sciencistoj deklaris, ke tiu ĉi simileco ne ekzistas, eĉ kontraŭe inter ili estas grava diferenco: la keloskarabo volonte loĝas en kelo, la urba malriĉulo ne volonte, sed necese.

Ekzistas skarabo, kiuj ŝatas la trankvilan ĝojon de la libera naturo kaj la vilaĝa vivo, ili vivas en arbaroj kaj sur kamparoj. Sed estas kulturskaraboj kiuj ŝatas la riĉan pompon de la grandurboj, kiel la kuireja blato, cimo kaj aliaj, ĉi tiuj vivas en grandaj lupalacoj kaj kiel kulturestaĵoj antaŭ longe forĵetis la krudan kaj sovaĝan econ de siaj vilaĝaj parencoj, ili jam ne vivas kun aliaj skaraboj – do ili ne estas kanibalaj sovaĝuloj – sed ilia ŝatata nutraĵo estas insektopulvoro. La bonkoraj urbaj homoj regas ilin ĉiutage per freŝa, bonodora verda kaj flava insektopulvoro, kaj tiel ili povas nutri sin abunde. Kie kompreneble la insektopulvoro ne estas disŝutita en la loĝejo kaj en ĝiaj aliaj lokoj, tie komence la malfeliĉaj skaraboj malsatas. Pli malfrue erupcias ĉe ili la atavismo, ili manĝas unu la alian.

-Tradukis: Apáti Kovács Béla-



Poezio

Szigeti veszedelem (Hungarian)

OBSIDIONIS SZIGETIAN

Pars prima (részlet)

(A Szigeti veszedelem első énekéből)

1.

Én az ki azelőtt iffiu elmével
Játszottam szerelemnek édes versével,
Küszködtem Viola kegyetlenségével:
Mastan immár Mársnak hangassabb versével

2.

Fegyvert, s vitézt éneklek, török hatalmát
Ki meg merte várni, Szulimán haragját,
Ama nagy Szulimánnak hatalmas karját,
Az kinek Europa rettegte szablyáját.

3.

Musa! te, ki nem rothadó zöld laurusbul
Viseled koszorudat, sem gyöngye ágbul,
Hanem fényes mennyei szent csillagokbul,
Van kötve koronád holdbol és szép napbul;

4.

Te, ki szűz Anya vagy, és szülted Uradat,
Az ki örökkén volt, s imádod fiadat
Ugy, mint Istenedet és nagy monárchádat:
Szentséges királyné! hivom irgalmadat.

5.

Adj pennámnak erőt, úgy irhassak mint volt,
Arrol, ki fiad szent nevéjért bátran holt,
Megvetvén világot, kiben sok java volt;
Kéért él szent lelke, ha teste meg is holt.

6.

Engedd meg, hogy neve, mely mast is köztünk él,
Bűvüljön jó hire, valahól nap jár-kél,
Lássák pogány ebek: az ki Istentől fél,
Soha meg nem halhat, hanem örökkén él.

Zrínyi Miklós



Poezio

Sieĝo de Szigetvár (Esperanto)

OBSIDIONIS SZIGETIAN

Pars prima (detal)

1.

Mi, kiu antaŭe kun junula menso
ludis per poemoj nur pro ama penso,
luktis ĉe Viola por la amkomenco,
verkas Mars-por.mon kun pli grava senco.

2.

Kantas mi armilojn, bravulojn, Osmanon*,
kaj la spiti bravajn ec mem Sulimanon,
la potencan, kies glavotenan manon
tremis Tut-Eiŭropo, timis lian famon.

3.

Muzo ! Vi ja portas laŭron ne por nuno,
sed eterne restos verda via krono,
kiun gemas steloj kun ĉiela lumo,
kaj konsistas bele ellunbril' kaj suno.

4.

Virgulin', patrino glora de l' Sinjoro
la eterna, kiun amas vi el koro,
kiel la monarkon, Dion kun adoro ;
sanktulिन', Regin' ! - mi pregas por favoro-

5.

Donu forton al la plum', ke mi laŭ vero
skribu pri l' mortint' por sankta Krist-afero.,
pri falinta korpo, nobla sinofero,
sed kies animo vivas sur la tero.

6.

Donu: lia nomo, viva en ĉi rondo,
disvastigu ĉie sub la sun' en mondo,
vidu paganar', ke homo Di-fidanto
mortas ja neniam, vivos en estonto.

*.Osmano: Otomano, la unua turka sultano, Iau kiu
la tuta turka imperio estis nomita tiel
Fejes Márton



Por infanoj

Kató Marianna

Hundopromeniganto



Por hundoamanto la hundo estas anima kunulo, familiano kaj ĝi signifas fidelon kaj fierecon. La mastro gvidas hundon per rimeno kaj kontraŭ li venas homo kaj li montras sian neplaĉon. Li rigardas flegme kaj li preteriras en granda arko.

-Sinjoro, bonvolu! Kial tre preterpasi nin?

-Kial? Ĉu vi demandas? Via hundo rigardis al mi strange, krome mi ne ŝatas la hundojn.

-Ĉu vi konas ĉi tiujn bestojn?

-Ne. Ili ne interesas min, eĉ mi esperas tiu ĉi interesiĝo restos por ĉiam. Mi abomenas ĉiun.

-Sed kiel abomeni, se vi ne konas ilin? Nu, venu kaj ni sidiĝu nur unu minuton por babili.

Ili ekiris al la proksima benko, vere al la invitita viro ne tro plaĉis la ideo, sed tamen li sekvis la hundoamanton. Ili sidiĝis, eĉ ankaŭ la hundo. Ĝia mastro forigis de sur ĝi la rimenon kaj li lasis, ke lia kunulo kaj hundoabomenanto konatiĝu.

-Nu, nu! Forigu de mi ĝin! Ĝi flagris min, tuj ĝi mordos min. Kial ĝi eklevis sian piedon? Ve!

-Trankviliĝu, sinjoro! Ĝi nur deziras amikiĝi kaj manpreni.

-Ĉu manpreni? Ĉu hundo? Ne ridigu min, ĉi bestoj ne havas meson.

Apenaŭ tio ĉi estis dirita, viro kuregis subite al la benko kaj forŝtelis la tiean aktujon. Poste li fulmrapide malaperis.

-Help'! Help', ŝtelisto. Prenu lin!

La ŝtelisto jam estis fore, li ne povintus atingi lin. Sed tiam la hundo eksaltis kaj ĝi komencis kuregi post la ŝtelisto. Atingante lin ĝi saltis sur lian dorson kaj ĝi jetis lin sur la teron. Ĝi ne lasis lin ĝis la mastro ne alvenis. La hundoabomanto dankegis:

-Mi dankegas. Mi dankegas. Mi ne scias, kio okazus, se ĝi estus ŝtelita. En ĝi estis mia tuta mono... mi tiom hontas.... nu kiu homo farintus tion

por mi? Venu al mi, kara hundo! -li diris al la hundo kaj li karesis ĝin.

-Kial vi estis tiom lerta hundo, vi ricevos de mi bongustaĵon. Bonvolu veni kun mi!

Ili ekiris al bestonutraĵo-vendejo.

Post la okazo pasis unu monato kaj la hundoamanto promenis kun sia amiko, kiam venis kontraŭ ili alia hundoamanto. Kiu li estis? Certe jam ĉiu divenis. Ĉu ne?

-Tradukis: Apáti Kovács Béla-

HUNDOJ



ESPERANTO

ESPERANTO

